
# Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2002 numero 2-a: marto / aprilo

Konatiĝu kun la pioniro Johannes Dietterle per la artikolo de Richard Schneller sur la paĝoj 23-27-aj.

# Rememorigilo

## SES informas
### Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031,
CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch &
gacond@bluewin.ch

✆ ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude GACOND

Redakta kunlaboranto:
Richard SCHNELLER.

## SES informas
### Redaktaj datlimoj
### por la venontaj numeroj

**2002-3**: majo - unua duono de septembro: marte 15.

**2002-4**: dua duono de septembro – oktobro: aŭguste 25.

**2002-5**: novembro-decembro: oktobre 15.

Antaŭdankon al la estroj de la lokaj kaj fakaj societoj pro la atenta konsidero, kiun ili alportos al la koncernaj datoj por la planado de sia aktiveco.

## SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen/Bern. ✆: 031 921 44 59. Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch.
Dietrich WEIDMANN, vicprezidanto, PF 301, 8034 Zürich. ✆: 01 251 50 25. Retpoŝto: info@esperanto.ch.
Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des Lys 4, 1010 Lausanne.✆: 021 653 14 67. Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.
Elisabeth LAUPER, kasisto, République 13, 2300 La Chaux-de-Fonds. ✆: 914 39 34. Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.
Chiara FABBRI, peranto itallingva kaj junulara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto: chiara-fp@bluewin.ch.

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4
Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

## Anoncoj

| Paĝo | Neesperantistoj & komercaj | Esperantistoj & nekomercaj |
|---|---|---|
| 1/8 | CHF 40 | CHF 20 |
| ¼ | CHF 70 | CHF 35 |
| ½ | CHF 110 | CHF 55 |
| 1/1 | CHF 180 | CHF 90 |



# Svisa kalendaro

## Marte

**03:** Wil: EKW-kunveno.
**04:** Lausanne: LES-kunveno.
**05**: Genève: Ĝenerala jarkunveno de La Stelo.
**06:** Luzern: LES-kunveno.
**09-10**: Ski-renkontiĝo de JES.
**12:** La Chaux-de-Fonds: studrondo.
**12:** Zürich: ESZ-kunveno.
**16:** La Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
**16:** Rotkreuz: SAEF: 37-a GERI.
**21:** Basel: ESB: Lud-kunveno.
**27 – aprile 1:** La Chaux-de-Fonds: KCE: Plurnivela kursaro.
**30 – aprile 04:** Vigy ĉe Thionville, FR: 57-a Kongreso de SAT-Amikaro.

## Aprile

**03:** Genève: kunveno de La Stelo.
**03:** Wil: EKW-kunveno.
**06:** Luzern: Jarkunvenoj de SAEF kaj SES kaj 75-jara jubileo de LES.
**08:** Lausanne: LES-kunveno.
**09:** Zürich: ESZ-kunveno.
**18:** Luzern: LES-kunveno.
**20-21:** La Chaux-de-Fonds: KCE: SAT-Semajnfino.
**23:** La Chaux-de-Fonds: studrondo.
**26-28:** Konstanz: Bavela-Tago.

## Maje

**06:** Lausanne: LES-kunveno.
**07:** La Chaux-de-Fonds: studrondo.
**07:** Genève: kunveno de La Stelo.
**08:** Wil: EKW-kunveno.
**16:** Luzern: LES-kunveno.
**17-20:** Husum, Germana Esperanto-Kongreso.
**18-20:** Strasbourg: Franca Esperanto-Kongreso.
**25-26:** La Chaux-de-Fonds: KCE: Literatura monatfino.

## Junie

**01-07:** Plovdic, Bulgario: 54-a IFEF-Kongreso.
**04:** Genève: kunveno de La Stelo.
**05:** Wil: EKW-kunveno.
**07-09:** Zürich: ESZ: Semajnfina seminario kun magiisto TRIKSINI.
**14:** La Chaux-de-Fonds: komuna vespermanĝo.
**15:** La Chaux-de-Fonds: CDELI: Prelego de Renato CORSETTI.
**20:** Luzern: LES-kunveno.
**29-30:** Neuchâtel: KCE: Ekspo 2002.

## Julie

**03:** Wil: EKW-kunveno.
**20:** Luzern: LES-kunveno.
20-26: Leuven (Belgio) Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK.

## Aŭguste

**03-10:** Fortaleza, Brazilo: 87-a Universala Kongreso de Esperanto.
**03-18:** La Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.
**11:** Wil: EKW-ekskurso.
**22:** Luzern: LES-kunveno.

## Septembre

**04:** Wil: EKW-kunveno.
**19:** Luzern: LES-kunveno.
**21:** La Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
**28-29:** Bellinzona: KCE: Monatfino.

## Oktobre

**02:** Wil: EKW-kunveno.
**17:** Luzern: LES-kunveno.

## Novembre

**02-03:** Rheineck: Kunveno Sunhejmo.

**06:** Wil: EKW-kunveno.
**16:** La Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
**21:** Luzern: LES-kunveno.

**Decembre**

**04:** Luzern: LES-kunveno.
**04:** Wil: EKW-kunveno.
**27 - Januare 03:** Borken (DE) 19-a Internacia Festivalo.

**2003-Januare**

**16:** Luzern: LES-kunveno.

# Vivo de SES

# Ĝenerala Kunveno

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO (LES)
kaj
SVISA ESPERANTO SOCIETO (SES)
kore invitas vin al la
*75-jara jubileo de Lucerna Esperanto-Societo*
kaj
Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo

## Luzern, Sabate 6an de aprilo

**Hotelo Steghof, Voltastrasse 2** (*)

## Programo:

**11h00**: **Solenaĵo** de la 75-jara jubileo de LES kun aperitivo, festparolado de magistro Andy KÜNZLI, honorigo de longjaraj membroj kaj muzikaj distraĵoj.

**12h30**: **Tagmanĝo**.

**14h00**: **Ĝenerala Kunveno de SES** (vidu la tagordon sur paĝo 5-a)

La **tagmanĝo** en la restoracio Steghof pagenda surloke kostas por plado vianda F 19, plado fiŝa: 19, plado vegetara, 16.50. Por faciligi la laboron de la restoraciestro LES petas vin **antaŭanonci** vian preferon ĝis plejlaste la **2-a de aprilo 2002** al s-rino Louise BACHMANN, Rütistrasse **8**, 6032 Emmen. Tel. 041 280 25 42 - E-majlo: louise.bachmann@bluewin.ch

**Tranokteblo:**
Por kiuj ŝatus jam alveni vendrede kaj/aŭ resti ĝis dimanĉo, al tiuj ni proponas:
Hotelo Steghof, Voltastrasse 2, 6005 Luzern: 1-lita ĉambro F 90, 2-lita ĉambro: F 130.
Tel.: 041 360 43 43, Fakso: 041 360 77 81, E-majlo: info@steghof.ch
La prezoj inkluzivas la matenmanĝon. - **Bonvolu mem rekte mendi la hotelĉambro(j)n.**

(Se vi bezonas helpon aŭ deziras distradon vendrede aŭ dimanĉe, bv. informi Paul SCHERER, Adligenstrasse 1/49, 6020 Emmenbrücke - Tel. 041 280 46 12)

(*) La hotelo Steghof estas atingebla de la stacidomo per trolebuso - haltejo Steghof: per la linioj n-ro 4, (direkto Hubelmatt) kaj n-ro 5, (direkto Allmend) - Atentu: urbo-bileto (City-ticket) estas havebla ĉe SBB. Ĝi evitigas al vi la manipuladon ĉe la aŭtomato por la aŭtobusa bileto.

# Ĝenerala Kunveno

## de Svisa Esperanto-Societo

### Hotelo Steghof, Luzern, sabate 6-an de aprilo, 14h00

## Tagordo

1. Komunikoj de la prezidanto.
2. Elekto de la voĉnombrantoj.
3. Protokolo de la lastjara kunveno 7-an de aprilo 2001 en Bern, kiu aperis en *SES informas* 2001-3 (ne laŭtlegota).
4. Jarkalkulo kaj bilanco 2001 kun raporto de la kaskontrolantoj (Paul SCHERER kaj Dieter ROOKE).
5. Agado 2002 kaj buĝeto.
6. Propono: La estraro proponas krei kategorion de patronoj, kiuj pagas duoblan jarkotizon. La kotizoj estas nun malaltaj. Certe pluraj membroj pretas pagi pli por subteni la informadon kaj varbadon. Listo de la patronoj aperos en nia bulteno. Necesas aldoni al la artikolo 8-a "*kotizoj*" de la statuto literon *"ĉ": "patronoj pagas duoblan bazan jarkotizon"*.
7. Diversaĵoj.

## Jarraporto

### aŭ kio okazis en 2001

La jarraporto estas resumo pri la dumjaraj aktivecoj. Ili estas pri-

skribitaj pli detale en nia bulteno *SES informas*, kiu aperis 5-foje kaj informis amplekse pri ĉio, kio okazis en svisa Esperantio.

## Estraro

Ni interrilatas regule perrete kaj kunsidas nur kiam necesas. Chiara FABBRI eniris la estraron; ŝi reprezentas la itallingvan membraron kaj traktas laŭbezone itallingvajn aferojn.

## Kunvenoj

La jarkunveno okazis la 7-an de aprilo en Bern kaj decidis pri novaj malaltigitaj kotizoj pro la forfalo de la kolektiva abono al *Literatura Foiro*. Tio entenas ŝancon regajni novajn membrojn kaj abonantojn al *SES informas*.

La aranĝoj en CDELI donas bonan okazon por kulturi la lingvon. Speciale menciindaj estis la rendevuo kun Herbert MAYER, direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, la 24-an de marto kaj la regiona kultura sabato 17-an de novembro, kiam Claude GACOND, Mireille GROSJEAN kaj Jean-Thierry VON BÜREN prelegis pri lingvaj temoj.

La kunveno de la grupestroj 13-an de oktobro en Bern traktis la demandon pri komunaj kotizoj kaj lanĉis la ideon integrigi ĉiujn esperanto-parolantojn en SES, egale ĉu membroj aŭ ne. Kelkaj grupoj ne estas interesitaj pri komunaj kotizoj kaj ni ne daŭrigas la klopodojn. Aliflanke pluraj grupoj disponigis al ni adresojn de interesatoj, kiuj ricevas prove nian bultenon. Dum tiu kunveno ni interŝanĝis multajn spertojn, kio estis sentata tre utila por la loka agado.

La regiona kultura kunveno ESZ/SES 8/9-an de decembro en Zürich plaĉis pro la varia programo. Claude GACOND konatigis la verkiston Karolo PICH kaj la magia TRIKSINI sorĉis kaj trompis la publikon elegante. Li revenos junie 2002 por malkaŝi siajn trukojn.

## Eŭropa jaro de lingvoj.

Diversaj faroj kaj agoj klarigis kaj akcentis tiun deklaron, ekzemple:

Artikolo en la speciala eldono de *Babylonia;*

Disdono de tiurilata broŝuro de UEA en la internacia konferenco *Sprachkreis Deutsch* septembre en Bern;

Prelego de Claude PIRON en la universitato de Genève kaj alia de Dietrich WEIDMANN en Zürich okaze de la internacia tago de lingvoj 26-an de septembro;

Finfine dissendo de pluaj broŝuroj al edukaj kaj kulturaj instancoj.

## Responditaj enketoj

Laŭdezire de la ĝenerala direktoro de Unesko, la sekretariejo de la Svisa Unesko-Komisiono enketis junie pri la eblecoj lerni esperanton en lernejoj aŭ aliloke kaj pri la

rezultoj de tia instruado por plibonigi la rilatojn inter nacioj kaj popoloj. Evidente la lobia laboro de UEA ĉe Unesko vekis intereson.

Ofte gimnazianoj elektas esperanton kiel studobjekton, kiam ili devas prezenti ekzamenan laboron. Ili kolektas materialon en interreto kaj enketas pri difinitaj demandoj ĉe CDELI, SES kaj lokaj grupoj. La pritrakto de tiuj informpetoj postulas seriozecon kaj objektivecon. Certe indas la peno, ĉar la temoj estas diskutataj en la klasoj.

## Gazetara servo.

Ni dissendis 4 komunikojn al la germanlingva gazetaro. Temoj estis la esperanta *eldono „La lada tambureto"* de Günter GRASS, la kaŝitaj aspektoj de la eŭropa jaro de lingvoj, la instruado de la retoromanĉa aŭ esperanta lingvoj por talentitaj infanoj kaj la ofta uzado de esperanto en interreto. Mankas informoj pri publikigo.

## Varbado

SES eldonis novan faldprospekton *„Heureka!"* en la germana lingvo por plenkreskuloj. Ĝi estas redaktita laŭ merkatikaj principoj. Ankoraŭ necesas koncepto por la disdono. Estas fakto, ke la varbado estas neglektita, eble pro la vasta uzado de la angla.

## JES.

Longe sentita espero plenumiĝas: la junularo esperanta svislanda reviglîĝas. 12 gejunuloj sub la stimuloj de Vera POCHANKE kunvenis decembre en Zürich, elektis novan estraron, adaptis la statuton senformale kaj diskutis rideme pri organizo kaj agado. Ili planas renkontiĝon 9/10-ajn marto 2002 en neĝoplena alpa vilaĝo. Aperos dufoje jare informbulteno redaktata de la prezidanto Benno FRAUCHIGER.

## Lokaj grupoj

La Stelo en Ĝenevo furoras. 55 personoj ĉeestis septembre la prelegon de Claude PIRON pri *„La vérité sur l'espéranto"*. Poste 15 interesatoj komencis lerni esperanton kun Christiane SIXTUS en la popolaltlernejo, dum aliloke oni apenaŭ trovas lernantojn.

En Lausanne François RANDIN sukcesis junie okazigi malgrandan ekspozicion en "Ecole Club Migros" kaj instruis esperanton al interesita grupo. Danke al iniciato de Stefano KELLER en EPFL fondiĝis esperanto-grupo kaj okazis prelegoj kaj kursoj.

Basel kaj Mulhouse eldonas kune la bultenon *Sud-Rejna Kuriero* kaj kreis efikan informilon. La varbado en *Colour-Key* (porjunula hobia programo) vekis intereson. Gejunula grupo svisa-germana aktivas en

la regiono, subtenita de Nicole BEROUD.

Luzern prezentis programon por la tuta jaro fare de Sonja BRUN. Aperis en gazeto longa intervjuo kun Paul SCHERER. Li bedaŭras la mankon de interesatoj kaj kursoj.

Zürich impresas pro la moderna klubejo, la laborejo de Dietrich WEIDMANN. Li ofertas daŭre diversajn kursojn kaj kunvenojn, prelegis la 26-an de septembro publike en hotelo *Krone Unterstrasse* pri la lingvoproblemo kaj organizis kun la edzino la sukcesan regionan kunvenon 8/9-ajn de decembro.

Wil SG organizis en marto informan vesperon kaj provlecionon kun Verena CHAVES-WALDER. Interesiĝis ĵurnalisto, kiu raportis en gazeto.

## Konklude

Oni ne multe aŭdas pri esperanto en la publika vivo, sed kiam mi listigas resume kio okazis dum jaro, mi kaj eble ankaŭ vi leganto tamen miras pri la multeco kaj fortostreĉo. Tial mi dankas al ĉiuj por la subteno kaj kunlaboremo.

La prezidanto: Bruno GRAF.

# Donacoj

Donacoj en Frankoj al SES: Anonime: 150; Cesare ARMARI, Chiasso: 25; Arthur BAUR, Zürich: 20; Claude BLANC, Renens: 5; Anne-Marie BRINNER, Genève: 50; David BUHLMANN, Prilly: 30; Alessandro CALAPRICE, Allschwil: 10; Pierre DORTHE, Lausanne: 30; Claude GACOND, La Chaux-de-Fonds: 50; Jean-Loup GAUDIN, Ferney-Voltaire: 25; Ernst GLÄTTLI, Brugg: 15; Philippe GOLD-AUBERT, Genève: 20; Marguerite JACCARD-BESSON, Château-d'Oex: 65; Jean-Rodolphe LAEDERACH, Peseux: 20; Werner LAEDERACH, Zürich: 20; Hans Meier, Basel: 15; Annalise & Carlo NICOLODI, Allschwil: 35; Marianne PROBST, Frauenfeld: 70; Josef ROGGER, Niedergösgen: 20; M. Th. SCHOCH-STÜCHELI, Zürich: 10; Fritz WASSMANN, Hinterkappelen: 65; Henri WETTSTEIN, Versoix: 35; Vera ZASLAWSKI, La Chaux-de-Fonds: 25; Sume: 810.

Donacoj en Frankoj por la Agado 2003: Dieter ROOKE, Oensingen: 20. Sume: 20.

Nome de SES la kasistino Elisabeth LAUPER kaj la redaktoro Claude GACOND dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco. Ili krome esperas, ke la pagilo akompananta la nunan bultenon revekos la malavarecon de la legantoj de *"SES informas"*.

**Jarkalkulo 2001 & Buĝeto 2002**
sur paĝo 9-a

**Jarkalkulo 2001 – budgheto 2002** **Svisa Esperanto societo**

Elisabeth Lauper, SES-kasistino, 16.02.2002

| AKTIVOJ | Jarkalkulo 2000 | Jarkalkulo 2001 |
|---|---|---|
| Kaso | | 267.00 |
| Poshtkonto | 12'257.80 | 1711.05 |
| Kunranta sparkonto CS-ZH -40 | 1'395.20 | 359.30 |
| WIR banko | | 38818.55 |
| Kasobligacioj CS-ZH | 25'000.00 | 25000.00 |
| Agado 2003 - CS-ZH -40-1 | 10'622.30 | |
| KCE favore SES | 15'000.00 | 15000.00 |
| Sparkonto CS-ZH -40-2 | 5'230.05 | |
| Sparkonto CS-Winterthur | 9'417.10 | |
| UEA konto sesa-v | 183.50 | 114.00 |
| Inventaro | 1.00 | 1.00 |
| Ant. imp. bonhavo ce ESV | 315.55 | 315.55 |
| Transaj aktivoj | 3'525.75 | 1097.60 |
| **AKTIVA SUMO** | **82'948.25** | **82'684.05** |
| **PASIVOJ** | | |
| Transaj pasivoj | -1'340.15 | -3'007.15 |
| Kapitalo | -66'958.50 | -54'930.70 |
| CDELI - Claude Gacond | -13'209.60 | -11'139.60 |
| Agado 2003 | -1'440.00 | -13'467.80 |
| **PASIVA SUMO** | **-82'948.25** | **-82'545.25** |
| **Gajno(+) Malgajno(-)** | | **138.80** |

| Elspezoj | Budgheto 2001 | Jarkalkulo 2001 | Budgheto 2002 |
|---|---|---|---|
| Informado, varbado | 4'000.00 | 3'653.15 | 4'000.00 |
| Omagoj, laborrimedoj | 100.00 | | 100.00 |
| Subvencioj, premioj, projektoj | 1'000.00 | 1'000.00 | 1'000.00 |
| Literatura Foiro | 2'400.00 | 2'400.00 | |
| SES informas elspezoj | 2'900.00 | 1'894.10 | 2'000.00 |
| Kunvenoj kaj kunsidoj (GK, estrara, regionaj) | 1'700.00 | 1'588.40 | 1'500.00 |
| Intershanjho servo (Dieter Rooke) | 50.00 | | 50.00 |
| Argus | 1'500.00 | 1'739.20 | 1'500.00 |
| Abono al revuoj | 50.00 | 115.00 | 115.00 |
| UEA Kotizo | 120.00 | 132.60 | 130.00 |
| Administraj kostoj (afrankado, telfonkostoj, etc) | 1'000.00 | 996.10 | 800.00 |
| Bank kaj poshtspezoj | 200.00 | 169.35 | 200.00 |
| Diversajho | | 865.00 | 200.00 |
| **Elspeza sumo** | **15'020.00** | **14'552.90** | **11'595.00** |
| **Enspezoj** | | | |
| Membrokotizoj | -6'500.00 | -6'530.00 | -5'700.00 |
| Abono al SESi sen membreco | -300.00 | -460.00 | -500.00 |
| Donacoj, heredjho | -1'100.00 | -3'539.50 | -2'000.00 |
| Agado 2003 | -500.00 | -480.00 | -500.00 |
| Argus enspezoj | -675.00 | -675.00 | -400.00 |
| SES informas enspesoj | -200.00 | -424.00 | -375.00 |
| Bank kaj poshtinterezoj | -1'000.00 | -2'123.20 | -2'120.00 |
| Diversajho | | -460.00 | |
| **Enspeza sumo** | **-10'275.00** | **-14'691.70** | **-11'595.00** |
| **Malgajno(+) Gajno(-)** | **4'745.00** | **-138.80** | **0.00** |

# Tutsvisa aktiveco

# CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
✆ 032 967 68 55.
Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.
Emailoj: CDELI.VCH@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch
claude.gacond@ne.ch
martine.schneller@ne.ch

## Venontaj studsabatoj

**Marte 16: Didaktiko:**
**Studotemo:** Enprofundiĝo en la trastudo de la esperanta verbosistemo per aro da helpaj ekzercoj: pri la rolo de la sufiksoj -ig kaj -iĝ lige al la verba valenteco (preciza distingo inter transitiveco kaj netransitiveco), pri la kompleksa rolo de la participaj sufiksoj, pri la duobla rolo de la sufikso -ad, pri la senpera verbigo de neverbaj vortelementoj.
**Junie 15:** Kultura sabato kun Renato CORSETTI, la prezidanto de UEA.
**Septembre 21:** Didaktiko
**Novembre 16:** Didaktiko.
(Ĉiam studo ekde la 10h00 ĝis la 16h00 kun komuna tagmanĝo.)

# Novaĵoj de CDELI

Ni lastatempe danke ricevis kaj katalogis la jenajn novajn verkojn:

| *Aŭtoro(j)* | *Titolo* | *Donaco de* | *Nombro* |
|---|---|---|---|
| Pilger, Wouter F. | Baza esperanta radikaro | UEA | 1 ekz. |
| Albani kaj Buonarrotti | Dictionnaire des langues imaginaires | Dan Savatovsky | 1 ekz. |
| Wingen, W. kaj H. | Post la kurso | Amalie Veith | 2 ekz. |
| Da Silva, A. | La budhismo | Amalie Veith | 1ekz. |
| Da Silva, A. | Vivo de Nansen | Amalie Veith | 1ekz. |
| Schorta, Andrea | Steafan Loringett | Richard Schneller | 3 ekz. |
| Rohrbach, Marc A. | Architectonique musicale | Claude Gacond | 1ekz. |
| Onda, Hiromasa | La modernigita kampo-medicino | la aŭtoro | 1 ekz. |
| Waringhien, Gaston | Beletro, sed ne el katedro | Claude Gacond | 1 ekz. |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Sekelj, Tibor | Mondo de travivaĵoj | Claude Gacond | 1 ekz. |
| Urbanová, Eli | Hetajro dancas | Claude Gacond | 1 ekz. |
| Blanke, Detlev | Sprachenpolitik in Europa | la aŭtoro | 1 ekz. |
| Blanke, Detlev | Zur Struktur von Plansprachen | la aŭtoro | 1 ekz. |
| (Diversaj) | De A al B : festlibro por A. Albault | Claude Gacond | 1 ekz. |
| Balkan Tourist | Pri via feriado en Bulgario | la eldonisto | 1 ekz. |
| Esperanto-Jugend | Esperanto als Ratespass | la eldonisto | 1 ekz. |
| Sächsische Esperanto-Bibliothek | Alfabeta katalogo, vol. 1 | Philippe Benoît | 1 ekz. |

Ni memorigas, ke:
unua ekzemplero de libro aŭ dokumento ne povas eliri el la biblioteko,
dua ekzemplero povas eliri en kelkaj kazoj,
tria ekzemplero povas eliri laŭ la kutimaj pruntebloj.

Dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj! Ĝis nun la kolektoj de CDELI riĉiĝis nur danke al la donacemo de eldonejoj, redakcioj kaj libroposedantoj.

Claude GACOND & Martine SCHNELLER

## Martine Schneller respondas al demandoj

Ĉu vi bezonas helpon por katalogado aŭ ĉu estas laboro por fakulo ? (S-ro E. G.)

Fakte estas laboro por fakulo severe kontrolata, eble por eviti pirataĵojn... (Estas facile forviŝi aŭ transformi ion.) Mi povus ekzemple aldoni al ĉiu notico ekzistanta en RERO la vortojn «Lernu esperanton !» sed plej probable tio ne plaĉus al mia kontrolisto kaj mi estus elĵetita el la sistemo pli facile ol mi povis eniri... Kaj ne kredu, ke oni nur suspektus min... Oni scius ekzakte, dank'al diversaj kodoj, ke estas mi. Verdire, ĝis nun mi ankaŭ ne povis legi en RERO menciojn kiel «Ne lernu esperanton !» aŭ «Mi vendas mian malnovan aŭtomobilon. Profitu la okazon !» Mi do supozas, ke la regulo valoras por ĉiuj.

Tamen, inter la momento kiam libro alvenas en CDELI kaj la momento kiam vi povos legi ĝian noticon en RERO, estas multe por fari kaj helpo estas/estos ĉiutempe bonvena. Antaŭan dankon !

# ILEI

## Svisa Sekcio

Mireille GROSJEAN
CP, 2416 Les Brenets.
mireille.grosjean@rpn.ch

## Prigazetara informado

Per letero el Les Brenets datumita de la 4-a de februaro, Mireille GROSJEAN sciigis, ke ŝi jesis al SES por zorgado de gazetara

informado pri esperanto en Romandio, kaj tiurilate ŝi dissendis laborplanon al kunlaborontoj kaj buĝetproponon al SES. Kiel konsilantojn ŝi elektis Claude PIRON, Claude GACOND, Henri MASSON kaj Bruno GRAF. Aliaj kunlaboremuloj bonvenas.

Ni vigle esperas, ke ŝia projekto sukcesos plilaŭtigi la voĉon de esperanto en la gazetara medio kaj instruistaro de Romandio.

Kunlaboreme Claude GACOND.

## La lernejo Grande Ourse sin pretigas por akcepti Renaton CORSETTI.

La instruado de esperanto en la *"Grande Ourse"* orientiĝos dum la venontaj monatoj al pretigo de fruktodona kontakto kun Renato CORSETTI, la prezidanto de UEA kaj kun la partoprenantoj al la kultura renkontiĝo okazonta la 15-an de junio en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Esperеble esperantistoj el ĉiuj regionoj de Svislando rezervos la koncernan sabaton por renkontiĝi kun la prezidanto de UEA kaj kun infanoj studantaj esperanton kaj ties historion.

La instruistoj: Anke BROUWER, Claude GACOND kaj Vera ZASLAWSKI.

# JES


Junularo Esperantista Svislanda
Jeunesse Espérantiste Suisse
Junge Esperantisten der Schweiz
Gioventù Esperantista Svizzera
Giuventetga Esperantista Svizzer
c/o Vera POCHANKE
Zurlindenstrasse 110, 8003 Zürich
Telefon-numeroj:
hejma: +41.(0)1.451.16.51
oficeja: +41.(0)1.255.25.37
veronika_p@hotmail.com


# KCE


Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
✆ kaj fakso: (032) 926 74 07.
kce.esperanto@bluewin.ch


# Raporto

La Ĝenerala Asembleo de KCE okazis la 26-an de januaro. Krom la regulaj kulturaj monatfinoj bone sukcesis la Plurnivela Internacia Kursaro (PIK), kiu duobliĝis de du al kvar semajnoj, de kiu unu dum la paska ferioperiodo. Lastan decembron KCE etendiĝis per la starigo de KCE-Tiĉino prizorgata de Cesare ARMARI.

La Asembleo aprobis la starigon de Esperantologia Fakultato laŭ la propono de la Kultura Konsilio.

Kelkaj pribonigaj sanĝoj al la ekzistanta ekzamena regularo estas proponitaj kaj estos submetitaj al la koncernaj instancoj.

KCE ĝojas, ke SAT akceptis la proponon okazigi sian kongreson 2003 en La Chaux-de-Fonds.

La domflegkomisiono raportis pri plibonigoj kaj riparoj al la domo Ernest NAVILLE.

Dank'al la dediĉema subteno de niaj fidelaj apogantoj kaj donacantoj la financa situacio povis esti tenata en ekvilibro.

La asembleo memoris kun danko per minuta silento la amikojn, kiuj mortis lastan jaron, nome Cosette SANDOZ kaj Willy VOIROL, kiuj ambaŭ aktivis por KCE en la 70-aj jaroj, Yves PEYRAUT de SAT, kiu prelegis en KCE kaj speciale Fritz LIECHTI, kiu lasis al KCE testamentan legacon. Por pli da informoj kaj raportoj pri la Ĝenerala Asembleo kaj la programo 2002 de KCE bonvolu konsulti la koncernajn rubrikojn sur la lasta paĝo de *"Heroldo de Esperanto"*.

Sonja BRUN, prezidanto.

# Kunvenoj

**Marte 27 ĝis aprile 1:** 5-a Plurnivela Kursaro, printempa sesio por komencantoj, progresantoj kaj pri esperanto-metodiko.

**Aprile 20-21:** SAT-Semajnfino kun la temo *Kia rolo por la maldekstro en la nuna esperantio?*

**Maje 25-26:** Literatura Monatfino pri Kvaropo: la skota skolo debutis antaŭ kvindek jaroj.

**Junie 29-30:** Esperanto-vizito en Ekspo 2002, Neuchâtel.

**Aŭguste 5-18:** 5-a Plurnivela Internacia Kursaro, somera sesio por komencantoj, progresantoj kaj pri esperanto-literaturo.

**Septembre 28-29:** En Tiĉino: Tagoj pri Edmond PRIVAT.

## Naskiĝis KCE-Tiĉino

Ekde la Zamenhofa-Tago 2001 KCE havas filion por la itallingva Svislando. D-ro Cesare ARMARI estas la komisiito kun korespond-adreso: Esperanto, CP 1251, CH-6830 Chiasso 1. KCE-Tiĉino strebos relanĉi nian lingvon kaj ĝian kulturon en suda Svislando, unuavice per specialaj tagoj dediĉitaj al la duobla jubileo de Edmond PRIVAT: centa de la esperantiĝo kaj kvardeka de la forpaso. La aranĝo estas planata en Bellinzona fine de septembro.

# SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud EGGENBERGER, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur ✆ 052 233 47 64
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

## 37-a GERI

Gaja Esperanto-Rondo Instruisteca
Sabaton, la 16-an de marto, 9h30-16h15

en Rotkreuz

ĉe "Lindenstube", 4-a etaĝo de "Zentrum Dreilinden" (rozkolora konstruaĵo vid-al-vide de la stacidomo).

La aranĝo GERI ebligas praktike apliki esperanton. Ĝi taŭgas por komencantoj kaj por progresantoj ne nur fervojistaj. Iu ajn povas do partopreni tiujn aranĝojn kun interesa konversacio, neenuaj gramatikaj ekzercoj kaj distra parto. Partopreno senpaga, komuna tagmanĝo en la teretaĝa manĝo-salono de "Zentrum Dreilinden". Kompleta menuo F 15. La SAEF-kaso pagas la kafon. Bonvolu sendi vian aliĝon (kaj tiam indiku, ĉu vi deziras vegetaranan manĝon) ĝis plej malfrue la 12-a de marto al S-ino Gertrud EGGENBERGER laŭ la ĉi-supra adreso.

## Raporto

La 35-a kaj 36-a GERI okazintaj la 17-an de marto kaj 11-an de novembro en Rotkreuz grupigis ĝojige grandan nombron da interesuloj kaj regis tre gaja etoso.

La SAEF-estraro kunsidis dufoje en 2001.

La rilatoj kun IFEF estis tre bonaj . Ili trovis sian kulminon kadre de la Internacia Fervojista Kongreso en Tabor (Ĉeĥio).

Reprezentantoj de SAEF ne nur partoprenis la kunsidon de la grupgvidantoj en Bern, sed ankaŭ kunvenojn de Esperanto-Klubo Wil, Bazela, Lucerna kaj Zurika Esperanto-Societoj.

Por la sekretario Ernst GLÄTTLI sukcespromesa travivaĵo estis prelegado pri esperanto ĉe du klasoj en lernejo de Rheinfelden.

La Internet-paĝo de SAEF sub VRES (Unuiĝo Arta kaj Intelekta de Svisaj Fervojistoj), prizorgita de s-ro BANNWART, estis aktualigita.

Bedaŭrinde la evoluo de la membraro de SAEF ne estas tre ĝojiga. Nur unu nova aliĝo kompensis 11 membroperdojn pro morto (4) kaj maljuneco aŭ troa okupo (7). Entute SAEF kun siaj 93 anoj disponas je unu reprezentanto ĉe VRES.

Detalaj raportoj kaj protokoloj aperis en la bulteno *Svisa Fervojisto*, kaj la venonta Ĝenerala Kunveno okazos en Luzern je la 9h45 en Hotelo Steghof, Voltastrasse 2, antaŭ la festado de la 75-a jubileo de Lucerna Esperanto-Societo kaj la Ĝenerala Kunveno de SES.

# UEA

Universala Esperanto-Asocio
Svisa delegitino: Sonja BRUN
Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz.
✆ 041 790 46 40.
e-majlo: smbrun@freesurf.ch

## Raporto

Grandan dankon al ĉiuj membroj, kiuj pagis la kotizon por la jaro 2002.

La membroj-abonantoj, kiuj ricevas la organon *"Esperanto"*

certe rimarkis ĝian modernigitan aspekton kaj ĝuis la multflankajn artikolojn, kiuj informas pri la agado de Universala Esperanto-Asocio sub la gvido de nova skipo. Memoru, en marto vi ricevos la lastan numeron, se vi ne renovigis vian abonon per pago de la kotizo 2002. Vi certe ne volas maltrafi la regulajn informojn pri UEA, ĉu per la revuo *"Esperanto"*, ĉu per la Jaraŭ gvid-libro. Do, se la rozkolora enpagilo ankoraŭ kuŝas sur via skribtablo, bonvolu uzi ĝin. La kasisto dankas.

Estas ankoraŭ tempo por aliĝi al la Universala Kongreso 2002, okazonta en Fortalezo (Brazilo), 03-10-ajn de aŭgusto. La programo, ekskursoj, ktp. estas plej allogaj. Se vi povas, uzu la ŝancon konatiĝi kun tiu sudamerika lando. Informoj, prospektoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe mi.

Kiuj havas aliron al la interreto, tiuj povas jam ricevi la duan bultenon per la retadreso:

www.uea.org

Sincere salutas Sonja BRUN, ĉefdelegito de UEA por Svislando.

# Renkonto
## kun Renato CORSETTI

Renato CORSETTI, la prezidanto de UEA, vizitos nin en junio. Nepre rezervu la sabaton 15-an de junio por konatiĝi kun li kaj aŭdi lin okaze de kultura sabato okazonta en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. La detalan programon de tiu ĉi renkonto ni aperigos en venonta numero de *"SES informas"*.

Claude GACOND

## Vorto de la redakoro


Akirinte skanilon mi lernas kopii kaj reprodukti bildojn kaj fotojn kun la celo grafike plibeligi nian bultenon. En tiu chi numero jam ekaperas kelkaj pozitivaj rezultoj.

Mi alvokas, por ke ĉiu grupo kaj societo havigu al mi sian logobildon. Kaj tiel la societaj rubrikoj fariĝos pli originalaj. Tamen ĉiu konsciu, ke mia reprodukta kompetento estas tre amatora. Tial kunlabora helpo de junaj fakuloj estos bonvena.

Nia bulteno ne restu la afero de izolita redaktoro, sed pli kaj pli fariĝu kunlabora rezulto de skipo grupiganta plej diversajn kapablojn, tiujn de komputilaj ĵonglistoj, de talentaj desegnistoj, de verkemuloj kaj ankaŭ de laboremuloj pretaj faldi, agrafi, enkovertigi kaj dissendi la revuon.

Do ekal kunlaboro.

Claude GACOND.



# Grupa vivo

## Basel

Esperanto-Societo Basel
PF 103, 4005 Basel
✆ 0049 76 214 57 12
Kunvenoj: 20h00 en Salono ĉe
Haltingerstrasse 97

### Venontaj kunvenoj

**Marte 21 20h:** Vespero "Scrabble".

## Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"
Case postale 188, 1211 GENÈVE 20
✆ 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio *«Aux Cheminots»*, 7, rue des gares, Genève.

### Venontaj kunvenoj

**Marte 5:** Ĝenerala jarkunveno.
**Aprile 3.**
**Maje 7.**
**Junie 4.**

## Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo
Case postale : 389, 1009 PULLY
✆: (021) 729 58 02
<esperanto@isuisse.com>
<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00

Diskuta rondo: ĉiun trian lundon kun François RANDIN, Vallombreuse 14. Bonvolu telefone voki lin antaŭe 021 657 14 59.

### Venontaj kunvenoj

**Marte 4:** Kun Charlotte BLANC-MAILLARD: Sankta Jakobo de Kompostelo.
**Aprile 8:** Gramatikumado.
**Maje 6:** Rendevuo kun Karolo PICH kun Nancy FONTANNAZ.
**Junie:** Ekskurso je dato elektota.

Dum julio kaj aŭgusto partopreno al la feria pasporto.

Novaĵo: Jaqueline VASSEROT estas avino ekde la 25-a de februaro. Gratulon ne nur al la avino, sed ankaŭ al la patrino kaj ĵus-naskito.

# Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
✆ 041 280 26 42.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg.)

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - okazas paroliga kunveno de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz BRÜGGER en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

## Raporto

Paul SCHERER, la prezidanto de Lucerna Esperanto-Societo povis saluti 11 aktivulojn okaze de la Ĝenerala Kunveno, la vendredon 15-an de februaro. Kaj al 3 fidelaj membroj, kiuj bedaŭrinde estas grave malsanaj, li sendis specialajn salutojn. Lia raporto estas publikigita ĉi sube.

Ĉiuj fortoj de LES nun estas faskitaj por digne festi la 75-jaran jubileon de la societo. Kora invito iras al ĉiuj esperantanoj. Ĉiuj festu kun ni, sabaton la 6-an de aprilo je 11h00, en la hotelo Steghof en Lucerno. Vidu la detalan programon sur la paĝoj 4-5.

Sonja BRUN

## Jar-raporto 2001

Kaj nacie kaj internacie okazis vere katastrofa jaro, kio tute kontraŭas al la mondkoncepto de la vera esperantistaro.

1. **Membromovado**: De la nun 20 membroj (Giuseppe CASTELLI aliĝis), nur 13 vere povas aktivi, ĉar 4 estas ĉu malsanaj ĉu handikapitaj, du loĝas tro fore kaj unu ne scipovas esperanton. Subtenantojn ni havas nur kvin.

2. **Kunvenoj**: En la restoracio Emmenbaum en Emmenbrücke ni kunvenis 9 fojojn plus decembre unufoje en la restoracio Simplon. Krom Dieter ROOKE el Oensingen, kiu prelegis junie, kaj David YAKI el Kanado en januaro, ĉiuj programeroj estis realigitaj de niaj membroj. Meze partoprenis – la promenadon enkalkulitan, sen la 4 gastoj – ĉirkaŭ po 8 membroj. La ekskurso kondukis al Roggenhausen, Aarau, kaj per kaleŝo al Käpten Jo's Aafähre en Biberstein.

3. **Estrarkunsidoj** estis kvar (9.5, 30.8, 8.11 kaj 10.1.2002).

4. **Varbado**:

Kursoj ne okazis.

Andrea RÖLLI disponigis al ni sian diplomlaboron.

Ankoraŭ ne aperis la promesita artikolo pri esperanto en *Sprachspiegel*.

La studento Markus BRÜLISAUER, kiu intervjuis nin pri esperanto,

kompilis materialon por sia abiturienta ekzameno, kiu baldaŭ realiĝos.

De la SES-prezidanto Bruno GRAF ni ricevis tri *Pressenotizen* aperig-otajn en loka gazetaro. Sonja BRUN tion plenumis, sed nenio aperis.

Ĵurnalistino de la semajngazeto *Die Region* en Emmenbrücke intervjuis min. Aŭguste la artikolo aperis sub la titolo *Esperanto – für mehr Verständnis.*

Al *Neue Luzerner Zeitung* kaj *Die Region* Sonja BRUN regule sendis anoncetojn pri niaj kunvenoj. Ili ofte aperis.

Okaze de la *Eŭropa tago de la lingvoj* Sonja BRUN prelegis pri esperanto en la seminario *Barbara* en Menzingen.

5. **Agado de LES kaj de ties membroj**:

Sonja BRUN aktivadis ĉiam en KCE kiel ĝia prezidantino, en LF-koop kiel prokuristino kaj en UEA kiel ĉef-delegitino por Svislando.

Franz BRÜGGER ĉiam en la restoracio Simplon en Luzern kaj antaŭ ĉiuj regulaj kunvenoj en Emmenbaum gvidis paroligajn lecionojn, entute 16 fojojn.

Kelkaj LES-anoj partoprenis la du GERI-rondojn en Rotkreuz.

Koni REY, nia UEA-delegito, ricevis tri leterojn: unu estis korespond-peto, dua serĉo de persono kaj tria koncernis parokejajn adresojn.

Louise BACHMANN partoprenis la IFEF-kongreson en la ĉeĥa urbo Tabor.

Vigla retpoŝta trafiko okazis kaj inter la estraranoj kaj kun la SES-prezidanto Bruno GRAF.

La 7-an de aprilo en Bern kelkaj LES-anoj partoprenis aŭ/kaj la Ĝeneralan Kunvenon de SAEF kaj de SES.

La 13-an de oktobro en Bern mi partoprenis kunsidon de la lokaj prezidantoj.

6. **Diversaĵoj**: Kune ni trovis novan kapon por nia leterpapero, kiu similas al la malnova.

7. **Dankoj**. Al miaj gekolegoj en la estraro, al ĉiuj kiuj ebligis realigi nian programon, al Franz BRÜGGER, kiu tute regule paroligis niajn membrojn kaj al ĉiuj, kiuj funkciigis LES kaj praktikis kaj konatigis esperanton, mi sincere dankas.

La prezidanto: Paul SCHERER.

# PROGRAMO 2002

**Marte 6:** Simplon 14h00-16h00.
21: 14h00: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono. 14h30: kun Annelies DETTLING: sciindaĵoj pri abeloj.

**Aprile 6** (sabate): Jubileo 75-jara de Lucerna Esperanto-Societo kaj Ĝeneralaj Kunvenoj de SES kaj de SAEF en la hotelo Steghof.

**18:** 19h30: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono. 20h00: kun Paul SCHERER: biografietoj de famaj komponistoj.
**Maje 1:** Simplon 14h00-16h00.
**16:** 19h30: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono. 20h00: kun Anĝelo MELLINI: Poemoj kaj rakontoj.
**Junie 5:** Simplon 14h00-16h00.
**20:** 19h30: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono kaj 20h00: ludoj kaj enigmoj.
Julie 3: Simplon 14h00-16h00.
20: Ekskurso kun Margrit SCHERER: Ĝia programo koniĝos en junio.
**Aŭguste 22:** 19h30: rendevuo ĉe Wagenbach-fontano por promenado kun Paul SCHERER.
**Septembre 4:** Simplon 14h00-16h00.
**19:** 19h30: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono. 20h00: kun Louise BACHMANN: impresoj pri Skandinavio.
**Oktobre 17:** 14h30: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono. 14h30: kun Dieter ROOKE: 87-a Universala Kongreso en Fortalezo (Brazilo).
**Novembre 6**: Simplon 14h00-16h00.
**12:** 14h00: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono, 14h30: kun ĉiuj LES-anoj: kompilado de la programo 2003.
**Decembre 4**: Simplon 14h00-16h00.
**2003 Januare 8:** Simplon 14h00-16h00.
**16:** 14h00: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono kaj 14h30: intervjuo pri la kosmo.

# Kantono de Neuchâtel

## Studaj rondoj ĉe CDELI La Chaux-de-Fonds

La studrondoj kun Claude GACOND okazas ĝenerale la 2-an kaj 4-an mardon de la monato, kiam ne estas lernejaj ferioj.

Jen la venontaj datoj:
**Marte 12.**
**Aprile 23.**
**Maje 7.**
**Junie 14:** vespermanĝo kun Renato CORSETTI.

Se la ekstera enirpordo estas ŝlosita, sonorigu premante longe la butonon, kiu troviĝas maldekstre de la enirpordo.

Ĉiam kunportu la libron *"Paŝoj al plena posedo"* de William AULD (kiu aĉeteblas surloke) kaj ne hezitu pretigi kontribuon: paroladeton, ŝercojn, ludon, ktp. Sed eĉ se vi nenion pretigis, tamen venu!

Ĉiufoje improviziĝas agrabla paroliga programo en amika etoso. Antaŭ ĉio gravas, ke ĉiu povu

progresi en la praktiko parola, skriba kaj kultura de esperanto.

# Rheineck

## Sunhejmo

**Novembre 2-3:** Konferenceto por ateistoj. Organizanto: Dieter ROOKE, Äussere Klus 14, 4702 Oensingen.

# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil. ✆ 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntis-strasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

## Venontaj kunvenoj

**Marte 3:** Kun Bettina ZAHNDER: Alternativa medicino de Bruno GRÖNING,.

**Aprile 3:** Kun Stanislaw POCHANKE: Strategia laborplano de UEA / Celaro de SES ĝis 2003.

**Maje 8:** Kun Leonie SENNHAUSER: Ludovespero.

**Junie 5:** Kun Vera POCHANKE: Hinda geedziĝfesto en Madras.

**Julie 3:** Kun Stanislaw POCHANKE: Minigolfludo (renkontiĝo ĉe la stacidomo Wil je la 19h00).

**Aŭguste 11:** Kun Verena CHAVES-WALDER: Tuttaga ekskurso al Bergli Fuchsacker (renkontiĝo ĉe la stacidomo Flawil je la 09h30). Informoj ĉe Verena.

**Septembre 4:** Kun Dieter ROOKE: 87-a UK en Fortalezo (Brazilo).

**Oktobre 2:** Kun Stanislaw POCHANKE: Ni legas esperanto-gazetojn.

**Novembre 6:** Temo elektota.

**Decembre 4:** Kun Barbara POCHANKE: Barbara-Tago kun fonduo.

# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH
✆ 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>

Kunvenoj: la 2-an mardon de la monato je la 20h00 en Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich.

## Programo de Esperanto-Societo Zürich

**Mardon, 12-an de marto:**
Esperanto-Librejo Akazienstrasse 6.
**19.30**: konversacia rondo por ekzerci la lingvon (temo: ig/iĝ).
**20.00**: monata kunveno, gastoj bonvenas.

**Mardon, 9-an de aprilo:**
Esperanto-Librejo Akazienstrasse 6,
**19.30**: konversacia rondo por

ekzerci la lingvon (temo: aktivaj participoj).
**20.00**: monata kunveno, gastoj bonvenas.

# La kursoj

### de Esperanto-Societo Zürich

**Kubanische Salsa für Anfänger**
***Kuba salso por komencantoj***
Grundschritte, die wichtigsten Formen
*bazaj paŝoj, la plej gravaj formoj*
01.03.2002 - 05.04.2002
jeweils 20.15 – 22.00
Freitag Abend/vendredvespere
Einzelp. CHF 150.- Paare 240.-
(ESZ-membroj 120.-, paroj 200.-
junuloj ĝis 18 j. 60.-)


k-2002-03
**Esperanto für Anfänger**
***Esperanto por komencantoj***
Einführungskurs: Ziel: Grundkenntnisse
*Enkonduka kurso: Celo: bazaj konoj*
16.05.2002 - 18.07.2002
jeweils 18.15 - 20.00
Donnerstag Abend / ĵaŭdvespere
CHF 288.—
CHF 288.- (ESZ-Mitglieder 240.-; Jugendl. bis 18 J. 50.-)

k-2002-04
**Kubanische Salsa für Anfänger**
***Kuba salso por komencantoj***
Grundschritte, die wichtigsten Formen
*bazaj paŝoj, la plej gravaj formoj*
17.05.2002 - 14.06.2002
jeweils 20.15 - 22.00
Freitag Abend / vendredvespere
Einzelp. CHF 150.- Paare 240.-
(ESZ-membroj 120.-, paroj 200.-
junuloj ĝis 18 j. 60.-)

k-2002-05
**Zaubern lernen.**
**Wochenendseminar mit dem Magier TRIXINI.**
***Lerni sorĉi. Semajnfina seminario kun la magiisto TRIKSINI***
Wir lernen die Grundlagen des Zauberns. Zum Abschluss gibt es am Sonntag eine Vorführung mit den Kursteilnehmern für ihre Freunde.
*Ni lernas la bazon de la sorĉado. Je la fino dimanĉe estos prezentado de la kursanoj por iliaj geamikoj.*
7.06.2001 19.00 - 9.06.2001
proksimume 16.00
(Minimuma aĝo: 16 jaroj)
CHF 180.-
(SES-, JES- kaj ESZ-membroj 160.-)

# Kiu helpos?

Ĉe CDELI kuŝas centoj da kasedoj, kiuj indus je pritrakto. Temas pri radio-prelegoj, konferencoj, muzikaĵoj, ktp.
Kio estas la dezirinda helpo?
Unue aŭskultemo, kaj dum la koncerna aŭskultado, pretigo de resumo pri la kaseda enhavo kaj pri ĝia kvalito.
Poste registra kopio de la kasedoj indaj je troviĝo en prunto-servo.



# Kongresen

## Konstanz

### Invito al la BAVELO-TAGO 2002
### 26-28-ajn de aprilo en Konstanz

Kolpinghaus Konstanz, Hofhalde 10 A, proksime de la ĉefstacidomo kaj katedralo meze de la historia urbocentro de Konstanz.

Programo:

Vendrede 26-an de aprilo posttag-meze/vespere: alveno de malproksimaj gastoj, komuna vespermanĝo, interkona vespero.

Sabate 27-an de aprilo, 10h00: salut-vortoj de reprezentantoj de la urbo Konstanz, prezidantino de BAVELO, loka grupo de Konstanz; 10h30: prelego en esperanto; 12h00: komuna tagmanĝo; 14h00: ĉiĉeronado tra la historia urbocentro de Konstanz; 16h00: jarkunveno de BAVELO (gastoj estas kore bonvenaj); 18h00: ekumena diservo en esperanto en la katedralo Sankta Maria; 19h30: forveturo aŭ komuna esperanto-vespero.

Dimanĉe 28-an de aprilo (fakultative). matene: komuna ekskurso per ŝipo al la florinsulo Mainau.

Por aliĝo kaj ricevo de pliaj informoj: Thomas SCHÜTZ, Magdebuger Str. 12, DE-78467 Konstanz. Mobil: 0049 174 41 33 148.

Rete: Schuetz.Stuttgart@t-online.de

## Leuven (Belgio)

### Internacia Esperanto-Konferenco
### Scienco kaj Socio, 20-26 julio

**en oficiala kunlaboro kun la Universitato organizita de OSIEK: Organiza Societo de Internacia Esperanto-Konferencoj.**

Petu la detalan informilon al:
Esperanto 3000 Leuven, R. Ménada 44, BE 1320 Hamme-Mille. Retadreso:

esperanto3000@esperanto.be.

### Pri la pasintjara konferenco

Nancy FONTANNAZ partoprenis la pasintjaran 14-an OSIEK-konferencon en Straznice de la 14-a ĝis la 20-a de julio 2001. Jen kiel ŝi resume raportis pri tiu interesa aranĝo:

*La temo de la konferenco estis "Karolo PICH kaj liaj mondoj". Ed. BORSBOOM rakontis la malfacilan vivon de tiu ĉeĥa esperanto-verkisto (1920-1995) kaj parolis pri la poezio en la verkaro de PICH. Chris DECLERCK prelegis pri la esperant-ologiaj verkoj de PICH kaj pri la virino en lia verkaro. Josef DÖRR prezentis la lingvaĵon de PICH, kaj vekis viglan diskuton, ĉu necesas "piĉismoj". Claude GACOND pro malsaniĝo ne povis veni, sed ni*

*tamen povis aŭskulti lian surbendigitan prelegon pri didaktiko per piĉaj tekstoj. Miroslav MALOVEC informis nin pri la situacio en Ĉeĥio dum la totalisma reĝimo. Ni vizitis la urbeton, renkontiĝis kun la urbestro, vidis la kastelon Milotice, vinkelon, la muzeon Mikelĉice. La vesperoj estis riĉaj: prelegoj pri vino, folkloro, filatelo, folkloraj kantoj kaj dancoj, greka vespero... La 21-an de julio okazis vojaĝo al Litomiŝlo, la belega urbo de Karolo PICH.*

## Borken (Germanio)

### 19-a Internacia Festivalo

### 27 decembro – 3 januaro 2003

La plej fama esperanto-aranĝo por familioj kaj personoj 25-55 jaraĝaj.

Petu la detalan informilon al: Hans-Dieter PLATZ, Postfach 1148, DE-34303 Niederstein. 0049 5624-8007. Retadreso:
HDP@internacia-festivalo.de

# Nia Historio

## J. DIETTERLE 1866-1942

### kaj la Esperanto-Instituto en Saksio 1909-1936

**Resumo el germanlingvaj artikoloj**

En la jaro 2000 aperis germanlingve broŝuro de Germana Esperanto-Instituto kun kontribuoj pri la historio de la germana esperantomovado. Sekve mi provas resumi du interesajn artikolojn rilate al Johannes DIETTERLE (1866-1942) kaj al la Esperanto-Instituto en Saksio (Sachsen): Hans-Burkhard DIETTERLE, *Prof. Dr. Johannes DIETTERLE – Initiator für Esperanto* ; Ulrich LINS, *Zur Geschichte des Esperanto-Instituts in Sachsen 1908-1936.*

### Nepo fidela al sia avo

La nepo de profesoro DIETTERLE, Hans-Burkhard DIETTERLE, ne okupiĝis pri esperanto ĝis sia 60-a jaro kaj nur post emeritiĝo komencis interesiĝi en 1991 pri la lingvo internacia kaj pri la agadoj de sia avo, kiu estis pioniro de esperanto en Germanio kaj ankaŭ internacie. Li konstatas, ke bedaŭrinde multaj dokumentoj, leteroj, notoj kaj libroj perdiĝis dum la dua mondmilito, sed dank'al siaj esploroj li retrovis interalie korespondadon milpaĝan de Johannes DIETTERLE kun la vortaristo profesoro Eugen WÜSTER, nun en la posedo de ties filo Thiele WÜSTER.

## Biografiaj sciigoj

Johannes DIETTERLE naskiĝis en 1866 en la urbo Kemnico (Chemnitz). Li studis en la universitato de Lepsiko (Leipzig) kaj ekzameniĝis pri teologio, filozofio, orientaj lingvoj kaj pedagogio.

Ekde 1889 li instruis en diversaj saksaj urboj. En 1893 li fariĝis diakono en Mittweida kaj en 1896 luterana pastoro en Burkhardswalde bei Pirna (proksime de Dresdeno). En 1907 li revenis al sia metio de pedagogo en Lepsiko. Li estis jam verkinta pri religio, filozofio kaj pri loka historio. Lia mondpercepto estis proksima al la "Interna Ideo" de ZAMENHOF.

Kiel studento li okupiĝis pri volapuko kaj dum la Universala Kongreso de Esperanto en Dresdeno en la jaro 1908 li havis siajn unuajn kontaktojn kun la esperantomovado kiel observanto kaj konstatis, ke la esperantistoj perfekte interkompreniĝas.

Rapide, jam en 1909, li fariĝis konsilanto de Germana Esperanto-Ligo kaj kunlaboris kun la Reĝa-Saksa Esperanto-Instituto, interalie kiel ekzamenanto.

## Pri la fondinto de la Instituto

Ĉi tiun instituton fondis juna registara oficisto Albert SCHRAMM, aŭtoro de lernolibroj, eldonisto kaj vicprezidanto de la 4-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis sub la protekto de la reĝo August VON SACHSEN kaj en kiu ĉeestis reprezentantoj de la registaro.

La instituto dependis de la ŝtata ministerio pri internaj aferoj kaj ricevis jarajn subvenciojn. La agado estis en la unuaj jaroj tre vasta: instruo de esperanto, oficialaj ekzamenoj, eldono de lernolibroj kaj tradukoj esperanten por saksaj entreprenoj industriaj. La Reĝa-Saksa Esperanto-Biblioteko kun 1000 volumoj konsistigis parton de la instituto.

Albert SCHRAMM aktivis per prelegvojaĝoj, artikoloj en la taga kaj faka gazetaro kaj sukcesis gajni kreskantan simpation por esperanto.

En 1913 oni nomis lin direktoro de la Germana muzeo pri libroindustrio kaj skriboj (Deutsches Buchgewerbe- und Schriftmuseum) kaj kun li ankaŭ la Esperanto-Instituto translokiĝis al Lepsiko, urbo fama pro ties eldonejoj, presejoj, libromerkata centro kaj industria foiro. La nova funkcio de SCHRAMM malebligis al li pluan okupiĝon pri esperanto. Tial li devis demisii kiel direktoro de la instituto, sed mem proponis profesoron DIETTERLE kiel sian anstataŭanton. Ĉi tiun la ministerio konfirmis kiel gvidanton de la instituto en la jaro 1916.

## Aktiveco de Johannes Dietterle

Ekde 1911 la instituto ricevis publikan kaj financan apogon de la deputito kaj industriisto d-ro Albert STECHE (1862-1943). Dum la unua mondmilito ankaŭ la loka ligo de esperantogrupoj de Lepsiko helpe transprenis ĉiujn laborojn kaj la financigon de la instituto.

Sekvis laborplena periodo por la nova direktoro Johannes DIETTERLE, ĉar li devis plenumi siajn taskojn ekster la normala profesia okupo. Liaj ĉefaj celoj estis la plivastigo de la esperantoinstruo kaj ekzamenoj ekzistantaj en Saksio al la tuta Germana Respubliko formiĝinta

en 1918 kaj publika informado per precizaj statistikaj studoj pri la aktivoj de la esperantomovado. Dum Pasko 1918 okazis kunveno de reprezentantoj de la germanaj esperantoasocioj kaj ili decidis konfidi ĉiujn sciencajn kaj statistikajn taskojn al la instituto kiel centro de la esperantomovado en Germanio. La instituto do ne plu povis aktivi por komercaj entreprenoj kaj koncentriĝis pri la scienca studo de esperanto kaj la rilatoj inter lernejo kaj esperanto.

Krom la internajn problemojn de la movado DIETTERLE devis alfronti la postmilitajn malfacilaĵojn pro politikaj kaj ekonomiaj senordoj. Malgraŭ tiuj malfavoraj cirkonstancoj li sukcesis konvinki per siaj statistikaj laboroj la registaron pri kreo de Germana Esperanto-Instituto kaj trovis favoran eĥon dum la Internacia Pedagogia Kongreso organizita en 1922 kadre de Ligo de Nacioj en Ĝenevo, kie li intervenis pri la temo "Esperanto kaj lernejo".

En la sama jaro li oficiale nomumiĝis direktoro de Germana Esperanto-Instituto. Li gvidis ĝin ĝis sia emeritiĝo en 1932. La plivastigo de lia taskaro decidigis lin ĉesi la instrumetion kaj dum anticipa pensioniĝo li esperis realigi rapide kaj funde siajn ambiciajn celojn. En 1922 Germana Esperanto-Ligo rezignis pri organizo de ekzamenoj. Sekve de tio DIETTERLE kreis dum sia ofico 30 ekzamenajn komitatojn ministerie aprobitajn, de kiuj dependis 125 ekzamenantoj honorofice aktivaj.

Lia nelacigebla agado por la plu-evoluo de esperanto sur nacia kaj internacia niveloj kondukis lin al kunlaboro internaciskala. Interalie li fariĝis membro de la Akademio de Esperanto, vicprezidanto de la Lingva Komitato, membro de la Centra Komitato de UEA, ktp. En 1923 li prezidis la UK-on en Nurenbergo (Nürnberg) kaj povis kontribui al la sukceso de tiu kongreso kun 5000 partoprenantoj. Same li interesigis la respondeculojn de la Lepsika radio por dissendo de esperantokursoj destinitaj al larĝa publiko kaj poste verkis lernolibron.

Cele al disvastigo de la internacia lingvo li atingis la apogon de eldonistoj kaj librovendistoj. Ekzemple la eldonejo Ferdinand HIRT havis esperantofakon, kiun prizorgis la esperantisto Bernhard KÖTZ. Samtempe li verkis artikolojn pri *LEJBNICO (LEIBNIZ) kaj la ideo de mondolingvo, Kontribuoj al la historio de la movado pri mondolingvo* kaj alian pri *Esperanto kaj la lernejoj – minimumaj postuloj*. Li rebatis ankaŭ publike la argumentojn de la mult-nombraj kontraŭuloj de esperanto sur diversaj kampoj de scienco, kulturo kaj politiko.

## Epokfara verko

La kulmino de lia agado estis sendube la kolektado, ordigo kaj eldono de enkondukoj, gazetartikoloj, eseoj, paroladoj, leteroj kaj poemoj de L. ZAMENHOF en la *Originala verkaro*. Dum jardekoj tiu libro estis referencilo por la tutmonda esperantistaro.

### Kunlaboro kun Eugen WÜSTER

Lia batalo por la venko de la nova kaj progresema flanko de la esperantoafero respeguliĝas en lia subteno kaj defendo de la scienca vortarista laboro de profesoro Eugen WÜSTER, kiu demandis helpon al la instituto por la presado de la *Maŝinteknika vortaro* kaj la *Enciklopedia vortaro* esperanto-germana, kies kvar volumoj aperis inter 1923-1929. Bedaŭrinde pro malfacila financa situacio de la eldonejo kaj nesufiĉa vendado ne povis aperi la mankantaj volumoj malgraŭ la pledo de DIETTERLE uzanta ĉiujn okazojn por defendi ĝin.

## Statistikoj

En 1928 li publikigis en la revuo *Esperanto*, n-ro 24, artikolon pri *Tutmonda statistiko esperantista.* Interalie troviĝis en tiu jaro en Germanio 441 esperantogrupoj en 1087 lokoj kun 8490 membroj kaj 22'378 individuaj membroj. Estis ja "ora epoko" !

## Esperanto troviĝas en infanaĝo

Spite al la daŭraj financaj problemoj de la instituto, sia troŝarĝiteco kaj la internaj diskutoj en la esperantaj organizoj, DIETTERLE devigis sin senkompromise je plenumo de sia vasta taskaro favore al la granda ideo de tiu movado. Post multaj jaroj de intensa laboro li fine opiniis "ke la esperantomovado, kontraŭe al multaj optimismaj deklaroj, tute ne staras antaŭ la venko, sed male ankoraŭ troviĝas en infanaĝo".

Dume la ŝtataj subvencioj malkreskis, ne laste ĉar ili dependis laŭproporcie de la kontribuoj de la esperantaj organizoj. Ankaŭ la monaj subtenoj de la Leipciga Foiro malpliiĝis. Per fondo de nova patrona asocio li esperis ricevi la bezonatajn monrimedojn de "simpatiantoj de esperanto ekonomie pli bonstataj", sed en 1928 Dietterle rezigne konstatis, ke "esperanto en Germanio estas portata preskaŭ ekskluzive de la instruistaro kaj laboristaro".

## Malpermesoj

En la jaro 1932 li retiriĝis de sia funkcio en la Instituto ne nur pro nebona sanstato, sed ankaŭ ĉar la politikaj cirkonstancoj en Germanio aliiĝis kaj la novaj potenculoj naci-socialistaj baris la disvastigon de esperanto kaj fine malpermesis la aktivadon de esperantaj organizoj. Tiu evoluo iĝis ankaŭ persona katastrofo por DIETTERLE, kiu post 1932 plejparte rezignis pri privataj aŭ publikaj kontaktoj kun la esperantomovado. Fine la temo esperanto iĝis por li tabuo eĉ kun familianoj kaj konatoj.

La instituton gvidis poste Albert STECHE, jam tre aĝa, kredante, ke scienca lingvoinstituto povus supervivi, sed en 1936 la Germana Esperanto-Ligo estis malfondita la 15-an de julio far Heinrich HIMMLER kaj la samo okazis por la instituto la 31-an de decembro. STECHE skribis al la ministro pri Internaj aferoj, ke "per tio senglore finiĝis granda kun alta idealismo kaj abnegacio plenumita laboro, al kiu partoprenis multaj kleruloj kaj industriaj pioniroj". La biblioteko de la instituto eniris laŭ iniciato de STECHE la Prusan ŝtatan bibliotekon en Berlino kaj tiel saviĝis trans la milito.

## Fideleco al intergenta idealo

Konklude Ulrich LINS respondas al la demando : kio restis de la iama Saksa Esperanto-Instituto, kiun oni refondis en 1948 sub la nomo de Germana Esperanto-Instituto ? Multo apartenas nun al la historio, eĉ la *Originala verkaro*, ĉar intertempe aperis nova pli-ampleksigita eldono de la japano Ito Kanzi. Naŭdek jarojn post la fondiĝo de la instituto oni tamen devas agnoski, ke ĝi aperas multflanke kiel atentinda fenomeno en la historio de la germana esperantomovado kaj servis kiel instigo por fondo de similaj institutoj en aliaj landoj.

Respektindaj estas retrospektive ne nur la laboremo kaj engaĝiĝo de Johannes DIETTERLE, sed ankaŭ lia etika sinteno. Li restis neflekseble fidela al la intergenta idealo de esperanto, eĉ kiam pro la premo de naciistaj kontraŭuloj ŝajnis preferinde akcenti la praktikajn flankojn kaj malpli la pripacajn klopodojn kaj la intergentan komunikadon. Kiel "burĝa intelektulo" li tamen estis tolerema ideologie kaj politike kaj agnoskis la valoron de la laborista esperantomovado. Antaŭ sia retiriĝo el la instituto li akcentis, ke "la instituto fariĝis la centra loko por ĉiuj subtenantoj de esperanto kaj ĝia evoluo pro praktikaj kaj idealaj motivoj sen politikaj aŭ ideologiaj konsideroj". Estis ĉefe pro lia diplomatia sinteno, ke la instituto ne estis influita de politikaj pasioj regantaj en tiuj tempoj kaj ne disfalis en "neŭtralan" kaj "laboristan" tendarojn, sed servis al la tuta esperantistaro. Pro tio li meritas pli da atento kaj konsidero ol ĝis nun.

## Postnoto

Kiam mi kompiltradukis tiun tekston, frapis min la fakto, ke la pionira agado kaj la pedagogio de Johannes DIETTERLE havis similajn trajtojn kiel tiuj de Claude GACOND, iniciatinto de KCE kaj CDELI: neŭtrala sinteno politika kaj lingva. Ambaŭ kreis strukturojn servantajn al ĉiuj esperantistoj aŭ scivolemuloj pri interetna lingvo kun la ĉefa celo de funda studo kaj publika defendo de esperanto. Kompareblaj estas ankaŭ la sciencaj esplormetodoj aplikitaj al lingvolernado, interlingvistiko, bibliotekonomio kaj same la utiligo de modernaj komunikiloj kiel radio aŭ interreto. Malgraŭ multaj malfacilaĵoj ambaŭ restis fidelaj al la Zamenhofa "Ideo".

Richard SCHNELLER

-oOo-

Aĉeteblas brokante
La Originala verkaro de L. Zamenhof
kaj aliaj menciitaj verkoj ĉe la
Brokanta Libroservo de CDELI.

Ĉe CDELI neniu ricevita libro perdiĝas. La tri unuaj ekzempleroj riĉigas la kolekton mem de la biblioteko, kaj poste la ceteraj ekzempleroj listiĝas en la Brokanta Libroservo ebligante libro-interŝanĝojn kun aliaj bibliotekoj aŭ vendon al aĉetemuloj.

Interesatoj anoncu sian viziton, por ke la prizorgantoj de la servo estu surloke, kiam ili venos.

Ankaŭ eblas akiri malnovajn revu-kolektojn.

# Por la komencantoj

Nancy FONTANNAZ transdonis al ni tiun ĉi tekston, kiu rezultas el verkkurso kun Claude PIRON. Ĝi povas interesi komencantojn, kiuj celas riĉigi sian vortprovizon kaj iom mediti pri la vivo:

## Ĉiu el ni estas pretervivanto
## (el ni, kiuj naskiĝis antaŭ 1940)

Ni aĝas pli ol televido, penicilino, frostigitaj varoj, fotokopiado, plastaĵoj, kontaktaj lensoj, vidbendoj kaj vid-registriloj, kaj ol pilolo kontraŭkoncipa. Antaŭ radaro ni jam ekzistis, antaŭ kreditkartoj, atombombo, lasero, glob-krajonoj, manĝilarlaviloj, frostujoj, varmigaj kovriloj, klimatizo, ĉemizoj negladendaj, kaj antaŭ ol homo marŝis sur la luno.

Ni geedziĝis antaŭ ol vivi kune. Kolektiva vivo disvolviĝis nur en monaĥejoj. Por la britoj, *fastfood* estis fastotempa menuo kaj *big mac* granda pluvmantelo. Troveblis nek edzoj, kiuj dommastrumis, nek ĉirkaŭnaska liber-tempo, nek faksoj, nek eblo retmesaĝi.

Ni apartenas al la periodo antaŭ moderprezaj loĝejoj kaj antaŭ paper-vindoj. Tiutempe neniu parolis pri frekvenca modulado, artefarita koro, organ-grefto, elektrona skribmaŝino, nek pri junaj viroj kun orelringo.

Por ni komputilo estis aparato, kiu kalkulis la elektrokonsumon, blato estis parazito kaj muso katnutraĵo. Paraboloj troviĝis en la Biblio, ne surtegmente. Paĝaro estis papera, ne io surekrane legebla, *CDRomo* elvokus specon de kancero, junto malebligis, ke krano gutu, herbo utilis al bovinoj kaj kaseto por enŝlosi juvelojn. Ĉeltelefono ne estis io portebla, sed telefono en mal-libereja ĉelo. Roko estis geologia materio, *gay* estis gaja ulo, kaj *made in Taiwan* revigis pri io ekzota.

Sed ni certe estis bona raso, fortika kaj vivema, se pensi pri ĉiuj ŝanĝoj, kiuj skuegis la mondon kaj pri ĉiuj adaptoj, kiujn ni sukcesis plenumi. Ne mirige, ke ni fojfoje sentas nin memcertaj kaj fieraj pri nia kapablo transsalti la breĉon inter ni kaj la nuna generacio. Cetere, ĉu ni ne estas pretaj akcepti kelkajn eurojn retpoŝte?

Dio estu dankata, jen ni plu ekzistas.

Se ĉion konsideri, aperas, ke ni rimarkindas kiel elstara vino.

-oOo-

Ni atentigas la komencantojn, ke la **perkoresponda kurso por franclingvanoj** ree funkcias. Interesatoj petu la unuan prov-lecionon al:

Esperanto perkoresponde
CP 5031
2305 La Chaux-de-Fonds